n-ro 85

julio 2004

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Kongresa programo

Fine de junio ankoraŭ ne haveblis la detaloj (horo, loko) de la IKEF-aranĝoj dum la Universala Kongreso. Ili aperos je la IKEF-retpaĝo kaj eblas peti ilin de ikef(a)pandora.be.

## Misuzo de retadresoj

Ĉar mi konstatis ke la retadresoj menciitaj la reta versio de La Merkato estas sisteme misuzataj por sendi spamon, mi estonte, menciante adreson, anstataŭos la signon '(a)' per '(a)'.

rr

## Enhavo

IKEF-eldonoj - Laborplano de UEA ........................ 3
Regularoj de EU - Esperantomobilo - Nova membro .......... 4
Komercaj petoj kaj proponoj ............................... 5
Monda komerco per Esperanto ............................ 6
Lernolibroj bezonataj - Kunveno en Verdun - Nekrologo Wensing 7

## Aldono

Al ĉi tiu numero estas aldonita cirkulero de Anne Tilmont.

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani. **Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉ*inio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

**IKEF-eldonoj restas haveblaj**

Novaj membroj de IKEF eble ne konas la eldonaĵojn de IKEF. Jen listo:

- Sindikata Terminaro, 1996, A5: esperantigo de simila terminaro de la Eŭropa Unio; 415 terminoj en germana-angla-franca-esperanta, kun esperanta indekso. (4 EUR)

- Ekofomo (Economie, Finance, Monnaie), 1992/2000, A5: esperantigo de financa-ekonomia terminaro de la Eŭropa Unio. (9,50 EUR)

- Inkotermoj 2000 (Internacia Ĉambro de Komerco): esperanta versio de Inkotermoj 2000, listo kun detalaj klarigoj de komercaj kondiĉoj kiel FOB, CIF... ĉiutage uzataj en internacia komerco kaj validaj ekde la 1a januaro 2000. (19 EUR)

- Unuformaj Kutimoj kaj Praktiko de ICC por Dokumentaj Kreditoj (UCP500): regularo de la Internacia Komerca Ĉambro. (9 EUR)

La distribuanto de la IKEF-eldonoj estas Flandra Esperanto-Ligo (http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php).

**Laborplano de UEA**

UEA invitas la asociojn relegi jenan liston de planitaj agadoj dum 2003-2005 el la laborplano 2001-2010 kaj sendi modif-proponojn al adreso labor-plano(a)esperanto.se.

* La Estraro de UEA instigu la bone funkciantajn fakajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri sama aŭ apuda temo.

* UEA aranĝu agadojn en regionoj, en kiuj ekzistas etna/nacia streĉo por pruvi la pac-potencialon de Esperanto kaj aparte apogu tiajn projektojn kiel Indiĝenaj Dialogoj.

* La rolo instrua/kuntena/aktiviga de la revuo de UEA estu atentata.

* Ni trovu solvojn por maksimumigi la eblecojn de esperantistoj en la entreprena kampo: por Esperanto per Esperanto.

* UEA havu klaran kaj deklaritan politikon pri la faka apliko de Esperanto.



**Regularoj de la Eŭropa Unio**

En la ĵargono de la EU ekzistas la franclingva esprimo '*acquis communautaire*', t.e. la traktatoj kaj leĝaroj kiuj ekestis dum la ekzisto de la EU, kaj al kiuj ĉiuj novaj membro-ŝtatoj devas aliĝi. Estas amasa kvanto da tekstoj, apenaŭ superrigardebla.

Por helpi al entreprenoj, la Eŭropa Komisiono listigis ĉiujn regulojn kiuj rilatas al entreprenoj en t.n. '*pink book*' (roza libro). Ĝi estas ĝisdatigita dufoje jare. Ĝi konsulteblas (nur en angla lingvo) je
http://europa.eu.int/comm/dgs/enterprise/pdf/pink_book_2003.pdf (349 kB).
Informpaĝo troviĝas je http://europa.eu.int/comm/dgs/enterprise/acquis_en.htm.

**Fermo de la projekto 'Esperantomobilo'**

La 28-an de majo 2004, mi rezignis de Esperantomobilo ĉar mi planas eventuale starigi E-centron en Bostono kiel parton de la ĉeno de komercaj E-centroj kiuj komenciĝas en la mondo. Tamen mi ne bedaŭris tiun decidon kiu montriĝis en mia privata rezigna letero al la projektpartoprenintoj:

Mi dankas al vi ĉiuj pro via partopreno en la projekto de Esperantomobilo. La revo estis bela, la laboro estis profesia, sed tamen la mono mankis. Mi devintus jam scii antaŭe ke kiam oni volas aktivi en Esperantio, ne nur bezonatas la energio, sed ankaŭ la mono. Tio estas bedaŭrinda, sed tiel estas la vivo.

Mi (kaj espereble ankaŭ la teamo) tamen lernis multege de la projekto. Mi lernis kiel volontuloj laboras kaj pri la (ne)donacemo de esperantistoj. Mi ne estas sola kun tiaj spertoj. Tamen, mi ĝojas ke mi iniciatis la projekton, ĉar alikaze mi tute ne scius kiel rezultintus. Mi ĉiam diras ke pli bonas provi fari kaj malsukcesi ol nenion fari.

La tuta historio de Esperantomobilo troviĝas en la USEJ-vikio:
http://www.tejo.org/usej/Historio_De_Esperantomobilo.

Chuck Smith, msochuck(a)yahoo.com
Calgary Esperanto Center http://www.e-centro.com/

**Nova membro**

330. S-ino Anne TILMONT, Cité des Carrières 10, BE 1430 REBECQ, Belgio,
rete atilmont(a)xs4all.be, telefono 067/63 79 74, fakso 63 81 37

## Komercaj petoj kaj proponoj

Bulgario

Mi estas peranto en borso en Bulgario. Mi deziras korespondi kun esperantistaj komercistoj. Margarita Savova, Ruse, retadreso esperanto_bgus(a)yahoo.com.

Ĉinio

S-ino Zhang Ai-yu (KN 865) dum la universala kongreso prezentos ĉinajn **sanigajn produktojn**. Adreso: Chao-Yang-qu, Tian-Shui-Yuan-Bei-Li, 17 hao Lou Bei-men 1408, CN-100026 BEIJING

Nia kompanio volas komerci (**importado kaj eksportado**) kun e-istaj komercoj de Indonezio, Srilanko, Tajlando, Malajzio, Kamboĝo, Vjetnamio, Laoso, Malajzio kaj Singapuro. Miaj informoj: (1) Nun ni urĝe importas 50-200 tunojn da natura kaŭĉuko, donu prezon CIF Ŝanghajo. (2) Ni eble eksportos super 1 konteneron da ŝuoj, silko, vestoj, CIF ŝipe celhaveno. Prezo: 3.80-5.80USD/paro. VangBino, Anqing, vangbino(a)mail.aq.ah163.net.

Ni estas fabrikanto kaj liveranto pri **lignaskulputaĵoj, artaĵoj kaj ornamoj**. Se via intereso kaj negoco rilatas al nia oferto, kontaktu kun ni. HUANG Zhengsu, Hefei, kunago(a)hotmail.com

**Ŝarĝeblaj Ni-MH-baterioj**. YANG Chaoyin, yardly(a)public.cz.js.cn

Kongo (D.R.)

Mi deziras gastigi ŝukomerciston. En mia lando oni bezonas ŝuojn. MATEO K.D., Lubumbashio, mateokd(a)yahoo.fr.

Rusio

Mi serioze deziras, kun helpo de rusa komercisto, **importi kafon** al Rusio (Moskvo). Adreso: vajsidin(a)mail.ru.

Mi serĉas **komercajn kontaktojn** en Ĉinio, Koreio kaj Japanio. Serguei, sergio(a)ss.om.msi.ru.



## Monda komercado per Esperanto

Se vi alĝustiĝas al unu el la ĉi subaj situacioj, vi estas invitata enskribiĝi al la Yahoo-laborlisto per-esperanto-komerco-informoj:

1. Vi deziras gajni monon per internacia komerco, tio estas, vi volas profesie agadi sur la kampo de importado kaj eksportado, ĉu kiel makleristo ĉu kiel rekta importanto/eksportanto kaj volas adopti Esperanton kiel laborlingvon. Eventuale vi eĉ pretas fondi entreprenon de internacia komerco.
2. Kvankam vi ne volas profesie kaj ĝisfunde agadi sur la kampo de internacia komerco, vi pretas iel ajn kunlabori por efektivigi negocojn, ekzemple helpante per loka kontakto kun entreprenoj esperantistaj, kiuj volas profesie agadi, aŭ plenumante aliajn taskojn farendajn, laŭ la laborprogramo starigita de la membraro de la laborlisto.
3. Vi estas komercisto (aŭ intencas baldaŭ esti) kaj eventuale interesiĝos pri importado aŭ eksportado de varoj enkadritaj en via laborkampo.
4. Vi estas estrarano de Esperanto-asocio kaj vi kredas, ke internacia komerco de varoj por konsumado (vestaĵoj, ŝuoj, manĝaĵoj, parfumoj, kodiskoj, komputilaĵoj, artaĵoj, hejmaj utilaĵoj, ktp.), je malgranda skalo, povos esti bona enspezofonto por via organizaĵo.
5. Vi apartenas al la monda movado de justa komerco, kaj kredas ke Esperanto povos roli kiel unu el la laborlingvoj por via organizaĵo.

Por enskribiĝi bonvolu sendi malplenan mesaĝon al per-esperanto-komerco-informoj-subscribe(a)yahoogrupos.com.br. Tiam vi aŭtomate ricevos demandaron, kiun vi devos plene respondi por efektivigi vian enskribiĝon al la laborlisto.

Bonvolu atenti pri du detaloj:

* Tiu grupo ne celas ĝustadire diskutadon, sed konkretan agadon. Diskutado pri strategio, teorio kaj statistikoj pri internacia komerco, prezentado de fakaj tekstoj kaj similaĵoj estas nur rimedoj por atingi la celon: evoluigi la internacian komercon per Esperanto. Do iel ajn vi devos konkrete kunlabori, ĉu kiel makleristo, ĉu komercisto, ĉu redaktanto, ĉu tradukisto, ĉu loĝistika apoganto, ktp.

* Tute ne estas permesata dissendo de spamo aŭ de mesaĝo ne koncernanta la celaron de la grupo.

Fabricio Valle

**Lernolibroj bezonataj en Ĉinio**

Plurloke en Ĉinio Esperanto havas ŝancojn kiel komerca faklingvo, ekzemple en Nankina Universitato. Jen la eblaj fakoj:

1. Ĝenerala Esperanto (10 poentoj)
2. Teorio de Internacia komerco (6 p.)
3. Geografio de Esperanto (4 p.)
4. Konversacio de Internacia Komerco (6 p.)
5. Komunika mesaĝo de Internacia komerco en Esperanto (4 p.)
6. Praktiko de Komputilo (4 p.)
7. Regulo de Internacia Komerco (6 p.)
8. Skribo kaj Traduko (6 p.)
9. Elektita legaĵo el Magazinoj pri Komerco (4 p.)
10. Kontista Scio (5 p.)
11. Dua Lingvo el la angla, franca, japana... (6 p)
12. Aliaj lecionoj

Tamen, mankas taŭgaj esperantaj lernolibroj. Personoj kiu konas lernolibron pri unu el la supraj temoj (ekzemple bona nacilingva teksto, tradukebla esperanten) bonvolu kontakti komerco(a)public.xa.sn.cn.

**Neformala IKEF-TAKE-kunveno en Verdun**

Je sabato 27 marto 2004, okaze de semajnfino de nordfranca E-asocio, okazis neformala kunveno de kelkaj IKEF-membroj (Janek Bender, Franz Braun, François-Xavier Gilbert, Roland Rotsaert) kaj TAKE-reprezentanto (André Grossmann). Estis priparolataj ebla ŝanĝo de la IKEF-kotizosistemo (laŭ ekzemplo de TAKE) kaj kreo de datumaro de IKEF-membroj. (Estas eta foto je http://mywebpage.netscape.com/rotsaert8000 /verdun.jpg.)

Ankaŭ kadre de la renkontiĝo, je vendredo 26 marto 2004 kelkdekaj partoprenantoj vizitis *Lacto Serum France*. La viziton iniciatis Janek Bender, kiu iam faris staĝon ĉe tiu firmao. Bazaj informoj pri Lacto Serum France estas je
http://www.interregion.com/FicheInfo?IdCli=29618&Ouv=IR&Lan=FR.

**Nekrologo**

Fine de aprilo 2004 mortis E.L.M. Wensing el Achel, Belgio. Wensing estis ĉefe konata ĉar li, kiel direktoro de (nederlanda) Philips, zorgis pri la eldonado de multaj ĝiaj reklambroŝuroj en Esperanto. Wensing en 1971 kandidatis kiel prezidanto de UEA, sed malvenkis kontraŭ Ivo Lapenna, kiu ricevis iom pli da voĉoj.
Kun Vogelmann (Germanio) kaj Carlèn (Svedio) li estris la 'Instituton por Esperanto en Komerco kaj Industrio', antaŭanto de IKEF.



En la papera eldono ĉi tie estas anonco de nova borsa terminaro.